

Numero: 232.
Septembro 2011.

19-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Kiom da...?

Antaŭ nelonge mia konatulo haltigis min kaj li direktis rekte al mi la demandon, kion mi multfoje aŭdis en mia esperantista vivo:

-Kiom da homoj parolas Esperanton?

Kion respondi je tiu ĉi demando? Kiu scias la precizan nombron? Efektive, kiu estas esperantisto?

Laŭ doktoro Zamenhof, tiu estas esperantisto, kiu uzas la lingvon por iu ajn celo.

Tuj venis la sekva demando: Tio signifas, ĉu teroristo povas esti esperantisto? Jes kompreneble, sed unue ni devus esplori, kiu estas la teroristo? El diversaj vidpunktoj tiaj homoj ofte naciaj herooj estas.

En Hungario en 1956 ankaŭ geesperantistoj batalis kontraŭ la rusaj tankoj. Do laŭ la tiama soveta vidpunkto tiaj ĉi batalantoj estis banditoj, nun ni dirus teroristoj. Sed el la vidpunkto de la hungara popolo ili estis herooj.

Ni lasu tion kaj ni akceptu, kion diris d-ro Zamenhof: kiu uzas Esperanton, tiu estas esperantisto. Tial estas ege malfacila nombri, kiom da geesperantistoj vivas en la tuta mondo. Krome, laŭ mi, vane komenci nombromiliton, ni neniam ekscios la veron.

Tamen estus interese scii, kiom da geesperantistoj vivas sur la terglobo, kiuj parolas kaj uzas Esperanton?

Kia estas la perfekta lingvoscio? Tio dependas de multaj aferoj. Ekzemple ankaŭ la forpasinta tempo influas ĝin, kaj ni ne forgesiĝu pri la diligenteco de la uzanto.

Ne sufiĉas nur ellerni fremdan lingvon, sed ĝin oni devas perfektigi, ekzerci ĉiutage. Sen ekzerco la akirita scio rapide forvaporigas.

La lernitan lingvon oni devas uzi aŭ almenaŭ ekzerci regule, ĉar se oni ne faras tion, tiam el la aktiva lingvoscio baldaŭ fariĝos pasiva.

Mi renkontiĝis kun multaj lingvolernantoj, kiuj post la sukcesa lingvoekzameno ne uzis la lingvon kaj post iom da tempo ili jam malkuraĝis ekparoli en tiu lingvo.

Do, kiom da homoj parolas Esperanton sur Tero? La precizan respondon neniu scias, kiel en la kazo de multaj lingvoj.

Se ni estas demandita pri ĝi, ni ne timu konfesi, ke ni ne scias la respondon.

Ne gravas la nombro, se la zamenhofa lingvo povos pruvi sian vivkapablon sur multaj terenoj.

-Redaktanto-



Interpretisto

Li estis mezaĝa, iom kalva viro. Onidire li parolis perfekte kvar – kvin lingvojn. Li estis dungita, kiel interpretisto.

Ĝenerale li ne havis multe da laboro. Dum la tuta tago li sidadis en sia kontoro kaj revadis. Foje – foje kun la direktoro li vojaĝis eksterlanden, kaj tiam li interpretis.

Foje okazis, ke la sinjoro direktoro petis lin dum pariza vojaĝo.

La oficialaj programoj jam finiĝis, kaj por ili restis unu libera vespero kaj nokto.

La direktoro decidis ekkoni la noktan vivon de la franca ĉefurbo. Ili iris al la mondkonata nokta amuzejo Moulin Rouge (ruĝa muelejo), kie la sinjoro direktoro konatiĝis kun ĉarmulino. Ŝi tre plaĉis al li, kaj deziris pasigi kun ŝi unu intiman horon.

Li alvokis la interpretiston, kiu jam drinkis sufiĉe multe, kaj apenaŭ li povis paroli pro multe da alkoholaĵoj.

-Georgo – diris la sinjoro direktoro – venu, vi devas labori. Bonvolu interpreti la sekvan....

La interpretisto ekridis:

-Sinjoro direktoro, nun mi ne deziras kromlabori, solvu la babiladon, kiel vi volas!

La direktoro unue ruĝiĝis pro la kolero, ĉar li ne toleris, se liaj subuloj kuraĝas kontraŭdiri. Sed la afero estis urĝa. La ĉarmulino volis foriri por serĉi alian klienton, kiu ne havas lingvan problemon, kaj ŝi povos komprenigi sin.

-Hejmenveninte mi maldungos vin – muĝis la direktoro al la interpretisto – Sciu, mi ellernos lingvojn, kaj mia firmo ne bezonos friponulojn. For de mi! Mi lernos lingvojn: anglan, francan, germanan kaj ĉiom. Terure, ke oni ne povas komprenigi sin eksterlande sen interpretisto. Nun mi bezonus lian helpon en grava afero, kaj tiu ĉi fiulo ne volas kromlabori.

La sinjoro direktoro trompiĝante pasigis la nokton ĉe forlasita tablo, dume lia interpretisto agrable amuziĝis kun ĉarmaj, noktaj papilioj.

Scii lingvojn estas valoro, precipe en la pariza nokto.

-Ŝaŝa-



La muziko de l' ĉieloj

La viro revante rigardis la firmamenton. La steloj malvarme palpepbrumis, kvazaŭ ili dezirus mesaĝi al il: Homo vi estas tro eta kaj malforta. Rigardu, kiom granda estas la universo. Vi estas nur polvereto kaj neniam vi povos kompreni la miliardojn de la ĉieloj.

Sed la viro ne aŭdis tiun ĉi mesaĝon. Li plu rigardis la profundon de la kosmo. Ĝi ĉiam trankviligis lin, kaj gaje li enlitiĝis. Post tiaj aventuroj li ĉiufoje dormis agrable kaj facile.

Ankaŭ nun li ĝuste volis eniri la domon, kiam neatendita li ekaŭdis tre mallaŭtan muzikon. Unue li ne sciis, de kie ĝi venas. La fonto de la belega melodio ne estis konata.

Li ĉirkaŭrigardis, sed li estis sola. Jam estis nokto kaj ĉiu enlitiĝis. La najbaraj domoj estis silentaj kaj nenie lumis lampo.

Kelkaj minutoj devis forpasi ĝis li komprenis, ke la muziko venas el la ĉieloj.

Li ekstremitiĝis. Ja, li aŭdas la voĉon de la galaksio. Okazis miraklo. La muziko estis eksterordinare belega.



Li denove sidiĝis sur la benkon, kaj kun fermitaj okuloj aŭskultis ĝin.

Ankoraŭ neniam li aŭdis tian belan muzikon. Sur la terglobo li estas nur la unusola ulo, kiun la sorto aŭ la hazardo donacis per ĝi.

Li ne sciis, kiom longe aŭskultis la strangan koncerton. Li bedaŭris, ke nur li aŭdas ĝin, ĉar se matene li rakontos la noktajn okazintaĵojn, certe la homoj pensos pri li, ke li stultiĝis.

Kion fari, ke li povu pruvi ĝin? Li estis senkonsila.

Subite venis ideo, kiu ŝajnis bonega en la unua momento, sed post kelkminuta pensado li forĵetis ĝin. Li frapetos sur la pordoj de la najbaroj kaj li elvenigos ilin aŭskulti tiun ĉi strangan muzikon.

Li jam preskaŭ ekiris, en la lasta momento li stopis sin kaj forĵetis la ideon. Li reiris al la benko kaj plu aŭskultis la muzikon de la ĉieloj.

Li sentis malrapidan ŝanĝiĝon en sia korpo. Lia tuta memo komencis transformiĝi kaj facileco estis sentebla de la kapo ĝis la plado.

--Kio okazas? --li demandis surpriziĝante -- Mi ŝvebas en la aero, kvazaŭ mi ne havus pezon. Ho, kiom bonega sento. Ankaŭ mi fariĝos stelo, kiel super mi tiuj multaj brilantaj punktoj.

Lia animo trankviliĝis, eĉ li sentis agrablan varmon en lia koro.

La muziko ne ĉesis, eĉ de tempo al tempo ĝi iĝis pli intensa.

Li jam ŝvebis super la urbo. Sube li vidis sian domon, kiel malgrandan alumetoskatolon. Ankoraŭ nelonge li vivis tie. Li promenis en la urbo kaj babiladis feliĉe kun la najbaroj kaj konatuloj.

Li flugis pli supren. Sub li estis la lando kaj baldaŭ la terglobo, kiel granda pilko.

Dume la mirakla muziko ĉirkaŭbrakumis lin. Li dancis kun la steloj.



Estis eksterordinara sento, kion ankoraŭ li ne sentis. Li komencis kunfandiĝi kun la universo kaj fariĝi la parto de la tuto.

Li ĝuis ĉiun momenton de tiu ĉi stato kaj el lia koro radiis feliĉo.

Antaŭe li neniam travivis tion ĉi, kaj de neniu li aŭdis similajn travivaĵojn.

Ne estis konate, kiom longe ĝi daŭros. Estus bone, se ĉi sento neniam ĉesus. Li sentus ĝin por ĉiam, ĉar fariĝi je la parto de la universo estas grandioza sento.

Matene li estis trovita sur la benko en la ĝardeno. Li mortis. Laŭ la kuracisto li silente endormiĝis kaj sentis nenion.

Rigardante lian vizaĝon oni povis konstati, stranga rideto kaŝiĝis sur ĝi. Liaj okuloj estis fermitaj kaj efektive kvazaŭ li estus dormanta.

Li ankoraŭ aŭdis tiun ĉielan muzikon, kiu vokis lin por senfina vojaĝo.

Nun jam li ĉiam estos feliĉa kaj kontenta. Nur la familianoj ploris. Eble se ili estus sciintaj, kiom belega estas la muziko de l' ĉieloj, tiam anstataŭ larmogutoj en iliaj okuloj ekaperus la brilo de la feliĉo.

La morto dolorigas nur la vivantojn, kiuj mortis, tiuj estas kontentaj ĉiuj.

-Apáti Kovács Béla-



(Je la memoro de Kapoŝvara esperantisto Péter Vukov 1946 – 2011.)

Poezio

En la kadro de Poezio rubliko mi deziras prezenti kelkajn poemojn de mia helpanto ERZSÉBET TUBOLY. Ŝi estas tiu grava, simpatia esperantistino, kiu lingve kontrolas mian eldonaĵon Vesperto.

Hajlo

El mornaj nuboj
Glacibulojn ĵetadas
Ĉielaj buboj

Ĉielaj buboj
Vidantaj homajn larmojn
Hurlege ridas



Eksterordinare varmega vetero

Mortiga Suno
Belegajn verdajn kampojn
Igas dezerto

Cikoniidoj
Staradas en la nesto.
Tridek sep gradoj.

Ĉe voĵorando
Jen sekiĝantaj ranoj.
Kion atendi?

Varmega vento
Turmentas la arbaron.
Falas folioj.



Hajkoj pri junia vetero

Junia frosto
Triste tremas la plantoj
Suno sin kaŝas

Tridekkvar gradoj
Svenas plantoj, la natur'
Pluvon sopiras

Pluvas, pluvegas
Jen ĉielaj kanaloj
Elverŝas akvon

Pluvas, pluvegas
La vento furiozas
Arbojn kuŝigas

Pluvas, pluvegas
Ŝtonoj en akvon dronas
Etas la homo

Pluvas, pluvegas
Inundo ĉion kovras
Sunon ni sopiras



Du hajkoj

Maljuna Luno
El sub akvospegulo
Sin junan spektas

De sub la akvo
Faldvizaĝa Luno
Sin junan spektas

Nia juneco
Ĝis fin' nin akompanas
Pasint' ne pasas



Por infanoj



La avara maljunulo kaj la ruza vulpo



Antaŭ multaj, multaj jaroj vivis avara maljunulo. Dum la tuta tago li nombradis sian monon kaj li estis kontenta nur tiam, se ĉiutage li pliriĉiĝis. Li tiom amis la monon, ke al neniu li donis el ĝi. Liaj najbaroj vane petis prunte de li, la maljunulo ne donis al ili. Eĉ li apenaŭ manĝis, por ke li ne devu elspezi. Pri lia avareco oni moke parolis en la vilaĝo.

Li havis kokinojn, sed la malfeliĉaj bestoj apenaŭ ricevis ion manĝi.

En iu tago, kiam jam vesperiĝis, vulpo ekaperis ĉe la kokinejo, kaj ĝi decidis ŝteli belan kokinon por vespermanĝi.

Sed la maljunulo konstruis altan kaj fortan barilon. Ĝi ne povis eniri la korton. Vane ĝi provadis, la barilon ĝi ne povis transsalti.

Ĝi hontis foriri sen kokino, tial li decidis, ke ruze akiros ĝin.

Ĝi vestis la maskon de vagabondo, kaj en la vilaĝo ĝi anoncis sin, kiel ulo, kiu ekvidas monon fositan en la tero.

La avara maljunulo ekscitite iris al ĝi, kaj diris:

-Sinjoro, mi ŝatus, se vi priserĉus mian korton kaj ĝian ĉirkaŭaĵon, ĉar laŭ mi tie estas kaŝita multe da mono en la tero.

-Bone – konsentis ruze la vulpo, kaj ili ekiris al la domo de la maljunulo.

Ĝi longe serĉadis ĉie en la domo kaj sur la korto. Ĝi rigardis ĉiun lokon, sed ĉiufoje malgaje diris:

-Mi ne trovas monon. Mi ne trovas monon.

-Ĉu vi rigardis ĉe la kokinejo?

-Tie ankoraŭ mi ne estis – ĝi diris – Ni iru tien kaj se ankaŭ tie mi ne trovos, tiam ĉe via domo ne estas mono fosita en la tero.

Ĉe la kokinejo la vulpo denove komencis serĉadi. Longe ĝi esploris la teron, eĉ ĝi kuŝiĝis surteren tie aŭskulti la tintadon de la mono. Fine ĝi iris al la barilo kaj subite ĝi eksaltis alten kaj kriegis laŭte:

-Ĉi tien! Ĉi tien! En la tero profunde kaŝiĝas multe da mono. Mi klare sentas. Portu fosilon tuj kaj komencu fosi! Sed faru grandan kavon sub la barilon, ĉar tie estas la mono. Mi sentas, tie kaŝiĝas tre multe da mono.

Ĝojegis la maljunulo, kaj rapide portis la laborilon. Li fervore komencis fosi, kaj dume li revadis, kiom da mono estos trovita, kaj ĝi pliriĉigos lian trezorujon.

Li jam longe fosis kaj li faris grandan terkavon.

-Ĉu ankoraŭ mi longe devos fosi, - demandis la avara maljunulo – Kiam mi trovos la monon?

-Estu pacienca! – trankviligis lin la vulpo – En la tero estas multege da mono. Mi sentas. Ĝi estas profunde sub la tero. Oni kaŝis ĝin bone, do vi devas fosi diligente, ke ĝi estu trovita.



Subite vesperiĝis. La vulpo ekkriis:

-Tuj lasu la fosadon!

-Kial, ja ankoraŭ mi trovis nenion?

-Morgaŭ ni daŭrigos la serĉadon. Se nun vi fosos plu, tiam malaperos la mono el la tero. Mi sentas, ke ĝi estas magia trezoro. Matene venu ĉi tien, kaj kiam la unuaj sunradioj ekaperos inter la folioj de la proksimaj arboj, vi povos daŭrigi la fosadon. Mi garantias, post kelkminuta laboro vi trovos ĝin.

La maljunulo obeis al la vulpo, kaj eniris en la domon. Dum la tuta nokto li ne povis dormi, ĉar malpacience atendis la mateniĝon.

La ruza vulpo kaŝrigardis, kiam la maljunulo malaperis en la domo, kaj ĝi transgrimis helpe de la fosita kavo en la korton, kie staris la kokinejo. Ĝi elektis la plej belan kokinon kaj ĝin metis en sian sakon.

Hejme ĝi feliĉe kaj ridante rakontis al siaj idoj, kiel ĝi trompis la avaran maljunulon.

Alvenis la mateno kaj la maljunulo kuregis al la kavo. Li volis daŭrigi la fosadon, sed li ne trovis la vagabondon, kvankam li promesis al li, ke matene ankaŭ li alvenos.

La pordo de la kokinejo estis malfermita kaj tiam li tuj komprenis, ke vulpo ŝtelis belan kokinon kaj ĝi trompis lin. Ĉe la barilo en la tero estas nenia mono. Li tial fosis la kavon sub la barilo, por ke la ruza vulpo facile povu enveni en la korton de la kokinoj.

Dio scias kiel, sed alitage jam ĉiu sciis en la vilaĝo, ke la vulpo superruzis la avaran maljunulon kaj eĉ ankaŭ la infanoj primokis lin kriegante post li:

-Avĉjo, fosu kavon, ĉar en la tero estas multe da mono!



-La onklo Adalberto-

Iluzio

